

& La tornistro:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de La oreloj de la leporo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Survoje pasis migra metiisto ; kaj
gaje fajfis: Lia dorstornistro

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ;
Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 de pano, lardo kaj viando plenis. ;
Sed, ho terur', subite lupo venis.

'3 Li rampis, por sin savi de atako, ; sur
arbon, tere restis lia sako,

'4 kaj li aŭskultis, kiel en la subo ;
festenas ŝmace el la sak' la lupu.

'5 Foriris tiu fine, kaj li povis ;
subrampi do, sed, kion li retrovis,

'6 pro tio la ĉielon ne tre dankis. ; La
tuta lardo kaj viando mankis.

'7 Eh! Li pluiri volis kun la resto, ; sed
io bruis. Ĉu la rabobesto
'8 revenis? Li rerampis en teruro, ; kaj,
ĉar dumtempe venis la obskuro,

'9 ne riskis plu subrampi ĝismatene. ;
Tiam descendis, laca, kaj — ĉagrene
.....

'10 li vidis, de malsato salivglute, ; ke l'
kampaj musoj manĝis ĉion tute.

'11 Nur paneretoj restis el la pano, ; kun
tiuj kuris formik-karavano.

'12 Nun li ekkriis: “Ho, la mondo

belas! ; Fortulo rabas, malfortulo
ŝtelas!”)